

La letero

de l' *Akademio de Esperanto*

N° 4 - julio - aŭgusto - septembro 1988

ISSN 0986-1181



Jen la kvara numero de nia Letero!

Ĝin ricevas la malmultaj pioniroj, kiuj helpis nin ĝin aperigi; dank'al ili multaj aliaj tra la mondo ĝin ankaŭ ricevis. Ĝi estas ankoraŭ modesta bulteno, sed ĝi volas ampleksiĝi; jam la nuna numero estas 8-paĝa: tio ne sufiĉas!

La estonteco estas en la manoj de la unuaj pioniroj, kiuj restigos sian konfidon al ĝi; ankaŭ en la manoj de novaj abonantoj kiuj rapidigos ĝian ampleksiĝon. Ni estas sur bona vojo sed ankoraŭ necesas multe klopodi.

Kun pli da paĝoj eblos plene trakti la problemojn, kiujn ni nurtuŝis. Eblos aliri pli gravajn problemojn, pli bazajn por la lingvo. Tial vi helpos nin. Vi fariĝos abonanto de la Letero, membro de la Amikoj, peranto en via lando.

Nia celo restos: pragmate konsideri la lingvon en si mem, konsili pri ĝia bona kaj bela uzado.

La Letero respondis al sopiro de la legantoj, kiel pruvas multaj ĉiulandaj leteroj. Eĉ eminentaj Esperantistoj levas demandojn pri mil kaj unu punktoj de nia komuna lingvo: ili estas kontentaj trovi bultenon, kiu pretas respondi al ili per jam elprovitaj solvoj aŭ per konsiloj pri la vojo en kiu serĉi tiajn.

Tra tiuj leteroj oni sentas la profundan amon al la lingvo; ankaŭ la timon antaŭ ĝia estonteco, se ne la timon ne trovi la ĝustan formon aŭ la plej estetikan formon por la ĉiutaga aŭ la beletra sinesprimado. Tiu amo kaj tiu timo ja konjugitaj estas tre kompreneblaj: ĉu nia movado ne konsistigas mondan diasporon?

Se, preter niaj movadaj gazetoj asociaj kaj informaj ja nepre necesaj, la Letero ne ekzistus, ni ja devus ĝin inventi, se nur por ligi inter si ĉiujn, kiuj volas lingvon interne pli fortan, pli belan.

André ALBAULT

PRI MEKSIKO.

Ĝi estas tipo de la monda internacieco. Mi ne konas lingvon kiu ne uzas tiun radikon por nomi la landon. Sed ĝi nomas ankaŭ la urbon. Lando Meksiko; Urbo Meksiko. Nur la finaĵo -o povas fariĝi -a, -e aŭ nenio laŭ la lingvoj. Sed Zamenhof donis al ni genian solvon per la substantiva -o. Sed se li donus anstataŭe -e, ni do dirus Meksike.

Sed la originala penso de Zamenhof estis: la popolo estas nomata de la radiko mem; la lando de la derivaĵo per -ujo; do, Meksikoj vivas en Meksikujo. Tio estis malbona elekto por la lando-nomoj. Efektive mi opinias ke se Zamenhof elektus la malan sistemon (En Meksiko vivas Meksikanoj; en Franco vivas Francanoj; en Italio vivas Italianoj ktp, universale, tiel por ĉiuj nomoj), nu tiu sistemo estus transvivinta. La motivo de mia konvinko estas, ke internacie, la nomoj de tiu tipo multe pli abundas ol la aliaj. Estas eĉ gravaj lingvoj de Azio, kiuj uzas nur tiun sistemon. La efiko de tiu stato de la aferoj estis tia, ke ĝi iom post iom erodis kaj detruis la perfekte unuecan primitivan uj-sistemon.

Unue, Zamenhof mem komencis dubi pri la taŭgeco de sia uj-sistemo. Li ja ricevis adresojn el la tuta mondo kaj mem konstatis, ke tia sistemo estas nur arbitra. Ke jam en sia reform-projekto de 1894 li proponis -i- anstataŭ -uj- estas nur duagrada (oni ankoraŭ havus: Meksikoj vivas en Meksik-io; kaj tio en sia principo estas ankoraŭ la sama afero.

Due, venis la teoriisto; nome S-ro de Beaufront-Chevreur. Ja li establis la tiel nomatan duklasan sistemon (Meksiko/Meksikanoj apud Germano/Germanujo). Sed li establis ĝin en ambigua maniero. Maniero kiu ne plaĉis al aliaj. Tiam komenciĝis aperi teorioj kaj proponoj pri la landnomoj. Ekde 1900 komencis aperi la uzado de sufikso -i-; Hodler ĝeneraligis tiun provon en 1919 kiel redaktoro de "Esperanto" organo de la tiama U.E.A. Sed ne la elekto de la sufikso estis vere esenca. Sed ĝi eventuale povis tuj liveri pli internaciajn formojn: Italio estas pli internacia ol Italujo, kies nura radiko estas internacia. Italia estas la efektive uzata vorto en multegaj lingvoj: en la Araba; en la Persa kaj la Turka, en la Bengala kaj Sinhala, en la Tajlanda kaj Korea, kaj en multaj aliaj ne parolante pri la Eŭropaj ĝi estas konata. En la Ĉina ĝi fariĝas Yidali = (jidali); nur la Pola kaj la Hungara uzas tute malsamajn nomojn.

Beaufront-Chevreur donis sian teorion jam en 1898. Zamenhof iom malsame donis la sian nur en 1911 (Respondo 47 de la L.R.); ĉiuj kon-as ĝin. Male al Beaufront li apogis sian teorion sur la aparteno al difinitaj kontinentoj de la koncernaj landoj. Beaufront ja apogis siajn konsiderojn sur la fakto, ke en iuj kazoj la nomo de la landoj aŭ de la anoj estas "pli grava". Iom ambigua konsidero.

En tiu respondo 47, Zamenhof konfesas, ke se "dum longa tempo (li) uzadis Brazilujo, Ĉilujo ktp... tio estis eraro. Ni povus diri (li aldonas) Brazilo, Ĉilo ktp" kaj li konsilas ion alian ĉar ĝis tiam Brazilo kaj Ĉilo estis uzataj kiel nomoj de popoloj! Fine li konsilas uzadon de Brazilio, Ĉilio ktp. Sed okazis, ke la internacieco apogis la formojn Ĉilio, sed Brazilo. Sed en Ĉilio la i ne estas sufikso, sed apartenas per si mem al la radiko. Cetere en kelkaj lingvoj tiu radika i estas anstataŭita de radika e.

En la sama respondo Zamenhof konsilas ne plu diri Meksikujo; li agnoskas ke "ni devus diri "Meksiko"; kaj li proponas uzadi Meksikio, kiun li asimilas al la paroj Alĝero-Alĝerio kaj Tuniso-Tunizio (la hodiaŭa Tunizio). Sed li ne konsciis ke Alĝerio kaj Tunizio posedas vastan internaciecon, ja sufiĉan por trudi tiujn nomformojn al nia lingvo. Io tia ne ekzistas por Meksiko. Sed la formo Meksiko venkis inter la du Mondmilitoj: ĝi ebligas same kiel en la Hispana diri Meksiko-urbo, Meksiko-distrikto, Meksiko-ŝtato kaj Unuigitaj Ŝtatoj Meksiko. Post la dua mondmilito tiel same estis uzata Meksiko. Sur tiu bazo la Akademio oficialigis tiun nomon per la Oka Oficiala Aldono al la Fundamento. Helpe de la jarlibro de UEA, mi povis determini en kiu proksimuma dato oni enkondukis en neologisma maniero la ĝis nun ne uzatan Meksikion. Tion mi nomas enkonduki ne pravan vorton dum prava vorto estas jam oficiala.

Fine, mi atentigu, ke en la sama Respondo Zamenhof diras ke dume tio estas nur liaj proponoj; sed ke "lingvo estas bazita antaŭ ĉio sur interkonsento" kaj li forte aludas la Akademion de kiu oni petu la starpunkton. Nu la Akademio oficialigis kelkajn landnomojn (inter ili Meksiko) kaj ĝi baldaŭ proponos liston de "normaj landnomoj" almenaŭ por la ĉefaj el ili.

A.A.

KONCEPTO DE INTERNACIECO

Jen baza koncepto por apliki la 15-an regulon de la Fundamento. La Fundamento cetere ne uzas - eble pro singardemo - la terminon "internacieco". Ĝi nur diras: "La tiel nomataj vortoj "fremdaj" t.e. tiuj, kiujn la plimulto de la lingvoj prenis el unu fonto, estas uzataj en la lingvo internacia sen ŝanĝo, ricevante nur la ortografion de tiu ĉi lingvo".

Sed ĉiuj poste parolis pri internacieco, kiu estas pli eksplicita, precipe ĝuste por la internacia lingvo, kiu ja devis kaj devas kaj ankoraŭ devos ĉerpi sian vorttrezoron en la "internacieco".

Tamen necesas distingi plurajn internaciecojn. Ekzemple, la vorto patro el la Latina pater retroviĝas en 3 Latinidaj lingvoj: H.P.I. padre, sed en la Franca kaj la Angla, ĝi troviĝas nur sub formo de derivaĵoj: F. paternel (=patra), A. paternal (s.s.); sed subevoluinta formo en la Germana: G. Vater kaj en la Angla: A. father. Sajne ĝi ne havas ekvivalentojn en la Slavaj lingvoj. Sed oni retrovas la saman radikon en diversaj aliaj lingvoj Indo-Eŭropaj. Ĝi estas radiko ĉefe Latinida, sed kun apogo de sametimaj vortoj Indo-Eŭropaj (ĉefe la Greka pater, la Sanskrita: S. pitr...).

Preter tiu kompleksa kazo, eblas distingi tute skeme diversajn internaciecojn. Estas internacieco, kiuj limiĝas al unu lingvofamilio: Latinida; Germanida, Slava ktp. Aliaj ampleksas ekzemple la tuton (aŭ preskaŭ) de la Indo-Eŭropaj lingvo-familioj. Tio estas la kazo de vortoj kiel sidi kaj vidi, kiuj aperas ne nur en la Latinidaj lingvoj, sed ankaŭ en la Germanidaj kaj la Slavaj. Per tio mi jam citis la ĉefajn fontojn de nia lingvo. Restas tio, kion mi nomas la monda internacieco.

La plej kompreneblaj kazoj estas la Japanaj vortoj: kimono kaj harakiri. Ili havas tre precizan signifon en la Japana; ekz-e kimono estas konstruita kiel nia vest-aĵo (ki = vesti; mono = aĵo). Sed internacie ĝi akiris la signifon de "tipe Japana vest-aĵo": la vortaroj donas kompletan difinon. Kiel tia oni povas supozi, ke tiuj vortoj estas monde internaciaj, ĉar ekde unu fonto ili penetris en ĉiujn aliajn lingvojn. Aliaj ekzemploj estas la marknomo de aŭtoj kaj motocikloj fabrikitaj en Japanio: Honda, Toyota, Kawasaki, Suzuki aŭ de Televidaparatoj kaj simile: oni ne finus citi tiajn nomojn konatajn sur la tuta planedo, se nur la varoj tien iris. En la sama kategorio oni devas meti la nomojn de la klasifikoj botanika kaj zoologia kaj bakteriologia... Ankaŭ la kemiajn nomojn kaj la landnomojn, kiuj ja vaste internaciigis, ĉar por nomi la landojn la plej simpla estas preni la nomon de la lando mem. Sed okazis diversaj akcidentoj, krom la miskomprenoj de buŝo al orelo. Plie, la popoloj povas ŝanĝi sian nomon, eĉ kiam la pli frua nomo jam fariĝis internacia aŭ eĉ monde internacia. Tiel hodiaŭ Hangug (Hanlando) estas nomata en la tuta mondo Korea/Corée... do Koreo en E-o. Tiel same la monde konata Albanio estas sialande nomata Shkiperija, kiu povus fariĝi en Esperanto Skiperio. Sed iafoje la koncernaj ŝtatoj malkontentas esti nomata per nomoj kiujn ili juĝas fremdaj. Tial Irano dekretis ke ekde la Unua Januaro de la jaro 1932 (aŭ simile) oni resendos la leterojn adresitajn al Persio. Tial Lanko kiam ĝi sendependiĝis alnomis sin Sri- (tio estas Nobla, Glora); tiel Sri-Lanko estis trudita al la tuta mondo anstataŭ Cejlon/Cejlan (Cejlono).

La internacieco estas limigita en Esperanto de bone instalitaj vortoj, kiuj ne faras problemon per si mem. Tiam eĉ pli internacia vorto ne sukcesas enpenetri la lingvon; krom sub formo de sinonimo aŭ de preskaŭ-sinonimo.

A.A.



DIFINI LA VORTON NEOLOGISMO

LASTATEMPE mi multe okupiĝis pri neologismoj, preparante mian studon "Kriterioj ĉe la takso de la neologismoj" por *Centjara Esperanto* (1987), detalan *Glosaro*, la poemaroj de *Edwin de Kock* (1988)* 23-paĝan kaj *Leksikoneto de mal-anstataŭaĵoj dudirekta, sinonimoj kaj antonimoj* (1987)*. Ci lasta konsistigas, efektive, parteton de granda kartokolekto cele al iama *Literatura vortaro*** . En ĝi devus aperi ideale ĉiuj vortoj neoficialaj kiujn ekuzis niaj aŭtoroj post 1930, kun fontindikoj.

Tiukadre ne povis ne altrudiĝi demando iom dorna: "Kio, efektive, estas neologismo?"

Tra la jaroj oni simple etikedis iujn vortojn per atentigoj kiel "ne en *Parnasa gvidlibro*," "ne en la *Suplemento de PV*", "ne en *PIV*" aŭ "ne en la *Neologisma glosaro de Vatré*." Baldaŭ oni sendube ankaŭ skribos: "ne en la *Suplemento de PIV*." Sed tio ne respondas la supran demandon, krom per la subkomprenigo, ke vorto iel iĝas malpli neologisma pro la nura envortariĝo.

La *Plena Ilustrita Vortaro* (1970) donas pri neologismo du difinojn, nome "1 Vorto, enkondukita en lingvon, kie ĝi ĝis tiam ne estis uzata" kaj "2 (ĉe Z.) Nova formo de vorto fundamenta, uzebla paralele kun ĝi, sed neniam ĝin mal-aperigonta."

Nu, tio estas diverskiale problema, precipe ĉar mankas aludo al la specialaj asocioj de la vorto por la esperantistoj.

Kiel sciante, pri la neologismoj jam ne malofte estis disputoj, eĉ partioj. Gis nun plej famis la kunpuŝiĝo inter Baghy kaj Kalocsay tempe de la *Budapeŝta Skolo*, kiun aludis Waringhien en *Kaj la ceter' - nur literaturo* (1983). Plia ŝtormeto leviĝis antaŭ nelonge pro la *Iltisa* manifesto de verkistoj aparte favoraj al novaĵoj nekutimaj. Tiu aspekto afekcia nepre postulas speguliĝon en niaj vortaroj.

La afero tute ne estas simpla, ĉar por verŝajne ĉiu esperantisto iuj neoficialaĵoj akceptindas dum aliaj vekas kontraŭstaron, eĉ abomenon. Do ne temas pri du partioj nete distingeblaj, unu por kaj la alia kontraŭ la neologismoj. Tion mi illustretas lige al la du difinoj de la *PIV*.

Unue ni konsideru la novajn vortojn enkondukitajn por esprimi novajn ideojn. Ekzemploj estas **filmo**, **lasero**, **astronaŭto/kosmonaŭto** kaj **komputero/komputoro/komputilo/kompilo**.

Rimarkendas, ke pri iuj tiaĵoj ekzistas neniu disputo. Jam ĉe ilia apero, oni akceptas ilin, kiel **filmo**, kiu fariĝis tuja parto de la lingvo.

Ni notu, ke la plej grava elemento en tiu akceptiĝo ne estas la **noveco**, malgraŭ la etimologia signifo de **neologismo**. Rolas ĉefe aliaj faktoroj, inkluzive

de opiniodiferencoj pri alternativoj.

Ni observu ankaŭ alion, nome ke de vorto al vorto multe varias la reago emocia. Pri **astronaŭto** kaj **kosmonaŭto** (ambaŭ tro fanfaronaj laŭ la Greka etimologio), oni levas ŝultron pli-malpli indiferentan, eble ĉar la ordinaruloj ankoraŭ ne vojaĝas en la spaco. Kontraŭe oni polemike jam verkis tutan etaŭ literaturon pri tio, ĉu ni devus diri **komputero**, **komputoro**, **komputilo** aŭ eĉ **kompilo**.

La ĉefa bazo por tiaj kontraŭecoj verŝajne estas, ke propono ne pruviĝas per si mem bona kaj senplue akceptinda, kiel en la kazo de **filmo**. Ĉe **komputero** la ŝtono de falpuŝiĝo estis por iuj la lastaj du silaboj, memorigantaj pri la sufikso **-ero**. **Komputoro** evitas tion, sed multaj ĝin tamen ne akceptas, pro kaŭzo ne facile divenebla. Aliaj emas al **komputilo**, kvankam ĝi kolizias kun diferenca signifo pli malnova. Generale oni ne deziras tute alian radikon kiel **komp-**, ial preferante **komput-** plus **-ilo**, malgraŭ ties signifkonflikto.

Ni nun rigardu la aferon rilate al la dua difino de la **PIV**.

Formoj uzataj paralele kun vortoj fundamentaj aŭ oficialaj estas **aŭto** apud **aŭtomobilo**, **trajno** apud **vagonaro**, **far** apud (**fare**) de kaj **mal-anstataŭaĵoj** kiel **dura** kaj **mava**. Pri ankaŭ tiu vortspecio oni reagis diversmaniere.

La mallongigo **aŭto** jam aŭdeblas sufiĉe ofte ĉe homoj tute konservativaj kaj ĝenerale ne emaj al "neologismoj". Ĝi ne kaŭzas proteston aŭ apartan emocion. Proksimume la samo veras pri **trajno**. La vorton oni uzas aŭ ne uzas, eĉ en ordinaraj konversacioj, sed ĝi ne vere provokas kontraŭstaron. Evidente la homoj agnoskas bezonon daŭre adaptiĝi almenaŭ sur la kampo de la teknologio kaj la scienco. Krome la vortojn sufiĉe altfrekvencajn oni preferas mallongaj. Certe estas ĝena, en nomoj por veturiloj ofte menciataj, la longeco de **aŭtomobilo** kaj **vagonaro**.

Sed oni jam ofte kverelis, eĉ akre, pri neologismoj kiel **far**, **dura** kaj **mava**. Tiajn utiligas ĝenerale nur la verkistoj, antaŭ ĉio la poetoj. Kaj ankaŭ ĉi-kaze gravas ne ĉefe la demando, ĉu la koncernaĵo estas "nova formo" - esprimo forstrekenda el la difino de la **PIV**. Por la ordinara uzanto de la Internacia Lingvo nek **dura** nek **mava** apartenas, aŭ rajtas iam ajn aparteni, al lia Esperanto demotika. Tiulon ne interesas la faktoj, ke **dura** jam fariĝis veterana en nia literaturo, dum **mava** aperis antaŭ relative malmultaj jaroj; ĉar gravas ĉi-afere ne tiom la aĝo kiom aliaj motivoj, kiel la unugroŝemo aŭ la ĝisostuleco. Eble la aludita ordinarulo tamen tolerus tiajn vortojn en poemoj, kondiĉe ke li ne mem bezonus legi ilin.

Aliflanke okazas disputoj inter ankaŭ la poetoj kaj la ceteraj verkistoj. Verŝajne **dura** estas por ili jam ĝenerale akceptinda kaj **far** almenaŭ tolerebla.

Sed multaj iom indignas pri eroj kiel **hati** kaj **dirta**, dum preskaŭ ĉiuj ekster Prago kaj la Itisa rondo kondamnas **ak**, **ma** kaj **aŭtem**. Mankas la spaco ĉi tie analizi la diversajn rolantajn en tio, kiujn mi parte diskutis en mia studo pri "Kriterioj ĉe la takso de la neologismoj", jam menciita.

Sed ĉu la ordinara esperantisto neliteraturema iam ajn rigardis ankaŭ **filmo**, **aŭto**, **trajno**, k.t.p., kiel "neologismojn"? Mi opinias, ke ne. Tiun ĉi vorton oni pleje ne aplikas, laŭ ĝia senco Esperantlingva, al formoj simple novaj aŭ neoficialaj, sed ĝin rezervas por atentigi pri ilia **problemeco**. Do konstatendas, ke dum ĉiuj neologismoj estas vortoj neoficialaj, ne ĉiuj vortoj neoficialaj estas neologismoj.

La difinoj de la PIV tamen ne traktas tiun problemecon kiu, por la Internacia Lingvo, montriĝas centra al ĉi temo. Kiel do ni devus difini tion? Jen mia provo:

"Neologismo Formo neoficiala efektive jam uzita en teksto aŭ konversacio, kiun pli-malpli emocie rifuzas iuj esperantistoj, dum aliaj ĝin konsideras utila aŭ eĉ nemalhavebla."

La leganto certe rimarkis en tio la vortojn **efektive** jam **uzita**, pri kiuj mi devas insisti. Troveblas ankaŭ formoj parencaj sed alitipaj, nome la **proponoj**, akceptitaj iafoje eĉ en la vortaroj. Ili tamen ne meritas tian dignigon, eĉ per la vorto **neologismo**, ĉar la deirpunkto por la leksikografio estu la efektiva lingvouzo kaj ne la dorlotajoj personaj.

Edwin de Kock

*Ciu havebla de UEA (6 gld.), aŭ de mi kontraŭ interŝanĝo(j).

Mi tre petas la kolegojn kunlabori, precipe per la alsendo de listoj, en kiuj estu nur formoj vere uzitaj kaj ne aperantaj en la iama **Plena vortaro sen la **Suplemento**. Mia **Literatura vortaro** celos speguli nian lingvoevoluan post proksimume 1930, surbaze de efektivaj tekstoj.

DEMANDOJ KAJ RESPONDOJ

D. Kion oni opinii pri la libro pri kemia nomenklaturado eldonita antaŭ nelonge en Pollando, kies aŭtoro proponas terminojn rekte kontraŭajn al la ĝenerale agnoskataj... ekzemple "hidrogenio, oksigeno, arĝentio..." (T.J. KUDREWICZ)

R. Provizore, ni konsilas sin deteni en uzado de tiuj novaj terminoj, kiujn vi citas. Estas necesa esplorado i.a. ĉe specialistoj pri kemio el diversaj landoj. Tamen ni havas la senton, ke la cetero de la libro donas fidindajn indikojn. Ni atendu la opiniojn de la ekspertoj. Sed oni detenu sin pri la nomoj de la kemiaj elementoj. La pli fruaj kemiistoj estis efektive pli respektemaj al la ĉiutaga lingvo kaj ili konservis nomojn, kiel fero, zinko, oro, kupro kaj, aliajn, kiujn donis al ni ZAMENHOF en la Fundamento, sekvante en tio la nomojn de tiuj metaloj konataj jam en antikveco. Ili sekvis la novajn nomojn de la metaloj kaj ne-metaloj eltrovitaj ekde la fino de la 18-a jarcento. La sciencistoj kutimiĝis nomi tiujn elementojn per nomoj finantaj per la fina silabo -ium (Aluminium, Beryllium). En Esperanto tiu silabo fariĝis -io (Aluminio, Berilio); tamen por eviti kolizion kun ĉiutagaj vortoj la ĝisnunaj terminologoj preferis formojn kiel taliumo (pro talio), radiumo (pro radio). Aliparte internacie inertaj gasoj havis specifan silabon -on (Krypton, Argon) kaj normale fariĝis kriptono, argono ... en Esperanto. Fine la ne-metaloj (antaŭe nomitaj 'metaloidoj') ne havis specifan finan silabon kaj konservis en Esperanto sian internacian formon: kloro, bromo, jodo, oksigeno, sulfuro, fosforo... La aŭtoroj de la libro iniciatis du aferojn.

1° Ili proponis, ke la fina silabo -i- estu formetebla en iuj derivaĵoj: kaj sekve ke anstataŭ Alumini-ato oni ricevu la pli agrablan kaj pli internacian formon Alumin-ato. Alidire la formo alumin- estas mallongigita formo de alumini-. Sed en kemio oni kutimis tion jam por multaj el la ne-metaloj; ekz-e, fosf- por fosforo, oks por oksigeno (oks-ido). Do ŝajne aprobinda punkto. - Sed tio kuntrenis la duan punkton.

2° Serĉado de ununura fina silabo por ĉiuj elementoj. Tiam oni malkovras tekston de IUPAC (Int. Un. por Pura kaj Aplikata Kemio), en kiu oni proponas normajn formojn por ĉiuj (~~≠~~ IOO) elementoj kemiaj. Tre supozeble la radikoj de tiuj nomoj estas establita laŭ principoj analogaj al la principoj de Interlingua, se ne sur tiu lingvo-projekto mem. Aliparte IUPAC elektis por finaĵo la silabon -io uzata en kelkaj lingvoj kiel la Hispana por respondi al la pli internacia -ium. Kaj la iniciatintoj de la menciita libro, kontentaj trovi finaĵon kiu ekzistas en Esperanto, simple ĝeneraligis ĝin, ne zorgante pri la fakto, ke Esperanto estas io alia ol Interlingua kaj do havas siajn proprajn imperativojn. Nome, en Esperanto la fina silabo, iaforte sufikso, estas tre ofta: kontrolu en rimvortaro. Tio signifas, ke povas okazi multaj konfuzoj. Konsciaj pri tio la aŭtoroj enkondukis ferio por fero kaj fransio por franciumo, ktp. Oni komprenu, ke en Esperanto ĉiuj substantivoj devas havi la finaĵon -o. En la Hispana, ekz-e, tio ne okazas kaj eblas distingi la elementojn disde ordinaraj vortoj. En aliaj lingvoj finaĵo -io tute ne ekzistas kaj ĝia uzo ne faras problemon. En Esperanto necesas trovi alian finaĵon ol -io, tiel ke ne okazu koliziojn, "konfliktojn" inter la lingvaĵo de kemiistoj kaj la ĉiutaga lingvaĵo. La aŭtoroj de la libro ne sukcesis doni aliajn formojn por ĉiuj kazoj kie konfuzo eblas: ekz-e, ili konservis radio por la radiumo trovebla en ĉiuj Esperanto-vortaroj...

Pro tio ni konsilas deteni sin de la uzo de tiuj novaj formoj por la kemiaj elementoj de la Tabelo de Mendeleev. Aliflanke, ni serĉas kontakton kun kompetentaj kemiistoj. Ni do revenos al tiu demando.

A.A.

D: "Kiel solvi la ĥ/k-konflikton? Ekz-e, ĥemio/kemio, teĥniko/tekniko, almenaŭ en la ĉiutaga lingvo. Kiun konduton havi en terminaroj kaj en ties titoloj? (Wera BLANKE).

R: Oni ne vidu konfliktojn ĉie, eĉ kie ili ne estas! Ambaŭ formoj teĥniko/tekniko apartenas al la 3-a Oficiala Aldono; por la du aliaj paroj la ĥ-formoj estas Fundamentaj, sed la k-formoj apartenas al la 8-a O.A. Ĉi tiu oficialigis plurajn parojn da ĥ/k-vortoj. Tiel hodiaŭ ĉiu povas uzi unu aŭ la alian formon: ĝenerale tio ne okazas laŭ la lingvo de l' interesito. Aliparte ĝis nun la evoluo favoris la k-formojn: litero kaj sono ĥ tendencis malaperi el la lingvo. Ĝia frekvenco estas malpli granda ol unu en statistika laboro farita super teksto de 10.000 literoj. Do, se iuj sentas konflikton, ili povas kontribui al ĝia solvado, per simpla kaj radikala elimino de la ĥ-variantoj el la ĉiutaga lingvo.

Tamen aperis rezistoj al tiu evoluo. Diversaj sciencistoj deziras reuzi la iam uzatajn n-formojn; ili eĉ klopodas etendi tiun renovigitan uzadon al ĉiuj, kiuj devenas de la Greko-Latina terminologio kaj entenis Grekan ĥi aŭ Latinan ch. Oni scias, ke tiu ch restis en diversaj lingvoj: ne nur en la Angla, Franca kaj Germana, sed ankaŭ en la Pola, Ĉeĥa kaj Nederlanda, plus kelkaj aliaj... Evidente tio donas pli da vario al la aspekto de diversaj teknikaj kaj sciencaj vortoj; ne neglektinde por la tiel abunda hodiaŭa terminologio. Plie aldoniĝas alia kategorio de ĥ-vortoj: la diversoriginaj propraj nomoj, antroponimoj kaj toponimoj; ni citu nur la Rusajn.

Kion fari, se iuj insistas pri sia deziro kontraŭstari la evoluon? Nu, se temas pri terminaroj, oni ĉiam citu ambaŭ formojn, se ili eblas. Tamen en la titoloj estus iom ĝene ĉiam citi la vortojn duoble: oni donu do nur unu formon, nome la k-formon, precipe se temas pri vorto konata de ĉiuj, kiel ekz-e, kemio, tekniko, mekaniko... Super ĉio oni evitu la grupojn rĥ, kaj ĥr, ne-prononceblajn por iuj popoloj. Cetere ja pro ili la Akademio kliniĝis super la demando kaj donis la permeson libere uzi anstataŭe rk kaj kr.

Pli radikala solvo konsistus ĉiam skribi ĥ, kaj lasi ĉiun libera prononci kiel li preferas. Por tiu speciala uzo kun duobla prononco eĉ estus penseble inventi novan literon, kiel ekzemple Ķ. Sed oni nur transportus la konflikton sur la terenon de la prononcado. La homoj protestus; kaj eĉ duoble!

A.A.

D: "Kiu estas la oficiala signifo de 'hemikranio'? (Fernand BOYET)

R: La Zamenhofa sed ne oficiala hemikranio laŭ etimologio signifas "duon-kranio". Sed en la praktiko de diversaj lingvoj, ĝi nomas specifan kapdoloron, kies unu el la karakterizoj estas, ke ĝi atakas nur unu flankan duonon de la kapo. Tial P.I.V. prave preferis la vorton migreno; kvankam same tima kaj rezultanta de misformiga evoluo de la sama vorto, en alia lingvo, ĝi taŭge malpli elvokas la nocion de duon-kranio. Ĉiokaze, mi konsilas al ne-kuracistoj uzi medicinajn vortojn nur kun plej granda singardemo: kuracistoj treege diferencigas migrenojn disde cefaleoj kaj de banalaj kapdoloroj. Vi simple diru kapdoloro... kiam vi doloras ĉe la kapo! Cetere, simila averto validas por ĉiuj specialaj, fakaj terminoj!

A.A.

* * * * *

"La letero de l'Akademio", trimestra informa letero eldonita de "La amikoj de l'Akademio de Esperanto", 5, rue Léon Cogniet 75017 PARIS-Francio- Direktoro: André BOURDEAUX-Redaktoro: Jean THIERRY-Pres.: E 12- I n° 40FF. Jara abono: 120 FF-pagebla ĉe kontoj: banka Crédit Lyonnais N°7090 F Pĉk 735 27 B PARIS - C.P.P.P. N° 69710
Peranto por tuta SKANDINAVIO kaj NORDO: S-ro Jan SOSNIECKI, Dalslandsgade 8, M 201_DK-2300 Kopenhago S. DANLANDO.- Poŝta ĝiro: 8 55 56 72